
# LA PERMANENTA REVOLUCIO

*ORGANO POR LA PROPAGANDO DE LA BOLŜEVISMA-LENINISMA KVARA INTERNACIO INTER ESPERANTISTOJ.*



Svend Johannsen
Australiensvej 24

[illegible] KAJ RESPONDUMO
[illegible] Ange Kjelsö, Rödovre,
[illegible] 18. Tryk Socialistisk
[illegible], København F.

PREZO
1 kajero 0,20 dan.kr. Abono por unu
jaro 2,40 dkr, 6 monatoj 1,20 dkr,
3 monatoj 0,60 dkr ktp aŭ egalval.
Ni ankaŭ akceptas int. poŝt. resp. kup.

EDITO – REDAKTO – ADMINISTR.
Propaganda Komitato de [illegible]
por propagandi la bolŝe[illegible]
ismon inter esperantistoj, Adreso
ESPERANTO [illegible], Danio, Kop-
enhago [illegible]

Svend Johannsen
Australiensvej 24

LA UNUA INTERNACIO DONIS AL NI LA PROGRAMON
LA DUA INTERNACIO VIGLIGIS LA AMASOJN
LA TRIA INTERNACIO DONIS EKZEMPLON DE KURAĜA REVOLUCIECO
LA KVARA INTERNACIO PLENUMU LA MONDREVOLUCION!

**PROLETOJ ĈIULANDAJ UNUIĜU!**

LA [illegible] DE LA LABORISTA PARTIO EN USONO (WPUS)

[illegible] TRIA KAJERO DE LA PERM. REV. ... KOPENHAGO ... 1935

PROLØGO

Je la dua de decembro de 1934 unuiĝis la amerika komunista ligo k Laborista partio de Ameriko al la nova "Laborista partio de Usono". La unuiĝon antaŭis plurmonata profunda k ambaŭpartia diskutado kies fino esprimiĝis en la jena principdeklaro. Simila evoluo okazis en Nederlando.

LA PRINCIPDEKLARO DE LA LABORISTA PARTIO EN USONO.

PRINCIPDEKLARO DE L.P.U.

akceptita je la unuiĝpartikongreso je la dua de decembro de 1934. La amerika komunista ligo k la Laborista partio de Usono interkonsentis formi fundamente de la jena principdeklaro la Laboristan partion de Usono.

LA RUINIĜO DE LA KAPITALISMO.

La kapitalismo kiel sistemo en la stadio de la ruiniĝo ĉie sekvigas por la amasoj sensekurecon, mizeron, faŝistan teroron k militon. La nuna mondkrizo estas pli ol ĝenerala depresio kutima en la ekonomia cirkulado. Sub la kapitalista sistemo de la ekonomiaj k sociaj interplektaĵoj la produktaparato ne plu povas funkcii efike. Ĝi ne funkcias por servi al la homaro sed por profitigi privatajn kapitalistojn k societojn. La kapitalista sistemo ne povas plzevolui la produktivfortojn - ĝi malevoluas ilin. Ĝi ne povas nutrigi la amasojn - enmeze de la superfluo ĝi lasas malsatmorti ilin.

IMPERIISMO K MILITO

La kapitalistaj nacioj kiuj serĉas novajn teritoriojn por investi la kapitalojn, novajn eblojn por kapitalakumulado, malmultekostajn krudaĵojn k bonajn markatojn por siaj produktoj eniris la imperiisman fazon de sia evoluo. Ĉar ili estas dividintaj la mondon inter si, la batalo je novaj kapitalistaj investiteritorioj, je krudaĵoj k merkatoj ĉiun tagon fariĝas pli akra. De la doloro de la krizo devigataj la kapiatlistaj nacioj deviĝis al doganaj, ekonomiaj k valutaj militoj, k al pliarmigo. Tial la degeneracia periodo de la kapitalismo estas signata per aro da plej teruraj bataloj kiujn konas la historio - imperiistaj militoj, militoj por liberigi la kolonipopolojn k revoluciaj militoj de la laboristo klaso por ties propra liberigo.

FAŜISMO.

Dum sia pli frua evoluperiodo la kapitalistoj batalis kontraŭ la eklezia k feŭda reakcio k deziris por sia verko la subtenon de la laboristo k kamparistoj. Dum la ruiniĝa periodo de la sistemo kapitalista la riĉul klaso nur povas savi siajn profitojn k sian privilegiitan situon per konstanta malsuprenigo al la vivindekso de la senproprajigita plimulto de la popolo k per ekestigo al militoj. Se la tiel estigita krizo socia estas atinginta sian maksimon k la laborista klaso pro manko de forta revolucia partio ne povas decide voji al revolucia solvo la lab. klaso mem disiĝas k perdas la konfidon de la meza klaso kies amasoj estas ankaŭ ruinigitaj per la krizo. Sub la regeco de la financkapitalo tiukaze sukcesas al la faŝismo mobiligi la rezignantajn elementojn de la meza klaso k eĉ kelkjan laboristojn sur reakcia fundamento. La "stabiliĝo" do estas atingata por mallonga tempo per pereigo de la laboristaj organizoj, per amasa mortigo al la antaŭbatalantoj de la laborista klaso k per la subpremo de ĉia formo kiu esprimas la memstarecon de la klaso. Sub la faŝismo foriĝas ĉiuj demokrataj rajtoj. Ĉiuj formoj de demokrateco pereiĝas. La sindikatoj k ĉiuj aliaj ... sendependaj organizoj de la laboristoj k kamparistoj estos disigitaj aŭ devigitaj fariĝi pasiva

parto de la ŝtataparato. La strikrajtoj ... La vivindekso de la ... soj ĉiutage plimalaktiĝas. Vera terroro estas aplikota ne nur kontraŭ revoluciuloj kiuj konfesas esti tiaj sed ankaŭ kontraŭ simplaj laboristoj kiuj ielpartoprenas veran batalon por sia liberiĝo. La faŝismo ... igas la popolon s3mante inter ĝin la plej primitivajn antaŭjuĝojn ... rasismo k naciismo. Tiel la kapitalismo en sia ruiniĝperiodo aliancas kun ĉio kio estas arkaa k reakcia k minacas returni tutajn naciojn ĉur la nivelon de sovaĝuloj k en la barbarecon.

LA SITUO DE AMERIKO EN LA MONDO.

Per la monmilito fariĝis Usono al la gvidanta imperiista potenco en la mondo. Ĝi transprenis la gvidantan rolon en tempo kiam la kapitalismo jam komencis degeneracii k do la antagonismo inter la grandaj potencoj pliakriĝis. La usona imperiismo ne povas ekspansii pluen sen ke ĝi unuflanke disturbas la potencejojn de la aliaj imperiistaj ŝtatoj k aliflanke terure malaltigas la vivindekson de la milionaj enloĝantoj en Usono, Sudameriko, Eŭropo k Azio kiujn ĝi direkte aŭ nedirekte ekspluatas k tributigas. Per la ekspansio de sia potenco la usona kapitalismo transigas la malstabilecon de la kapitalisma mondsistemo al siaj propraj fundamentoj. Ekonomio k politiko en Usono ĉiam pli dependas de militoj, revolucioj, krizoj en aliaj mondpartoj. Tiuj kondiĉoj tre atakas la diversajn klasojn, aliigas la klasrilatojn, akrigas k rapidigas la diferenciĝon inter la klasoj k apertas la vojon por rapidega revolucia evoluo de la laborista klaso. En la esenco de la potenco de la usona imperiismo mem estas la estas la neeviteblaj konfliktoj kiuj anoncas ĝian katastrofon.

LA ROOSEVELTPROGRAMO.

La R-programo estas esence la programo de la monopolkapitalismo, - ĝi koncentras la potencon k riĉecon en la manoj de ĉiam plie malgrandiĝanta nombro de financuloj k industriestroj. Ĝi plibonigas malferman aliancon inter industrio, registaro k bankoj. Ĝi plifortigas la monopolistajn tendencojn per la "codes" kaj rekomendas la ŝtaton kiel juĝiston por konfliktoj inter laboro k kapitalo. Ĝi provas ligi la sindikatoj al la ŝtataparato kapitalistan, disigas strikojn per la mensaĝo pri la nepartieca mildigo al la diferencoj per la registaraj aparatoj k atakas batalemajn laboristojn k organizojn. Ĝia grandega militorganiz programo devas servi k estigi ilon kontraŭ la nekontentaj partoj de la propra enloĝantaro k estigi batalilon por la usonaj interesoj imperiistaj kontraŭ tiuj de aliaj nacioj en la militoj kiuj ja estas neeviteblaj dum ankoraŭ ekzistas la kapitalismo.

LA SOLA ELIRVOJO.

Pro la kapitalismo, la pliakriĝantaj krizoj, la pligrandiĝanta senlaboreco, k mizero, faŝismo, milito k kaoso, kiuj ne nur vojas al decida katastrofo de la kapitalisma sistemo sed ankaŭ al returno en la barbarecon ekzistas hodiaŭ nenia elekteblo. Oni devas forigi la antagonismon de la kapitalismo mem, forpreni la proprajon k la kontrolon pri la krudaĵoj produktado k distribuado al la varoj for de la privatuloj k korporacioj por ke ili servu al la bezono de la homaro k ne al la profito de la kapitalistoj, k tiel konstrui socialistan socion. Tiel - nur tiel - povas la amasoj en la moderna mondo atingi riĉon, liberon, pacon k sekuron.

LA LABORISTA KLASO K ĜIAJ KUNBATALANTOJ.

La centra pozicio enmeze de la sociaj fortoj kiuj estas mobiligendaj por detrui la kapitalistan ŝtaton k la kapitalisman ekonomisistemon k por efiki la transiĝon en sciencan socialistan socion apartenas al la laborista klaso. Sed ĝi bezonas la subtenon per la aliaj partoj de la socio kiuj ankaŭ estas ekspluatataj k subpremataj. Partoj de la meza klaso, la ŝuldiĝantiĝintaj kamparistoj, la negroj kiel persekutata raso, la koloniaj k preskaŭkoloniaj popoloj en la usona imperio - tiuj estas la kunuloj de la usonaj laboristoj en la batalo kontraŭ la komuna malamiko. Nur per socialisma revolucio ĉiuj grupoj de laboristoj, ĉiuj subpremataj klasetoj en la popolo povas esti liberigataj de minacado, mizero k tiraneco.

LA KAPITALISTA ŜTATO K LA DEMOKRATECO.

Tiu liberigo nur povas esti la frukto de venko en revolucia batalo. La

kredo ke ni vivas en libera demokrata socio en kiu gravaj ekonomiaj ŝanĝoj povas esti atingataj per persvado, eduko, laŭleĝaj k parlamentaj metodoj estas iluzio. Tia kredo devas esti en ĉiu kapitalista socio iluzio, en ĉiu socio kiu konsistas el diversaj soci-ekonomiaj klasoj. Libero nur estas faktigebla en socio kiu fundamentas sur la ekonomia k socia egalo de ĉiuj kiuj ĝin formas. Sed neniu socia k ekonomia egal estas ebla se la produktiloj k la distribuado al la produktoj ne stra sub la kontrolo de la socio kiel tutaĵo. La kapitalista socio en kiu malgranda minoreco posedas k kontrolas la pruduktilojn estas - k povi esti nenio alia - kapitalista diktatoreco. La politikaj formoj de la kapitalisma socio - monarkio, demokratio, militdiktatoreco, faŝismo - estas nur la ilo per kiu esprimas sin la fakta diktatoreco de la kontrolanta minoreco. La ŝtato aŭ la registaro do estas nur la ilo per kiu la reganta klaso efikas k rezervas sian diktatorecon k subpremas la laboristan klason. Tial necesas por atingi ŝanĝojn en la ekonomirilatoj ke la laboristoj en urbo k kamparo havigas al si la kontrolon pri la ŝtata potenco per revolucia vojo. Tio estas politike necesa fazo.

LA KONKERO AL LA POTENCO.-LA LABORISTA ŜTATO.

La okazo por la ekregado de la laboristoj venos en la daŭro de la disiĝo de la kultura k ekonomia vivo sub la diktaturo kapitalista. Favorigata per la kreskanta, per la krizo efikita nekontenteco, gvidata per revolucia partio k subtenata per ĉiam pli granda k ĉiam pli gravaj parto partoj de la popolo ekkonkeros la laboristaro la potencon k finigos la detruantan eston de la kapitalista diktatoreco.

La plej fundamenta, dum la daŭro de la komuna akciono de la laboristoj estigita instrumento estos la sovetoj. La sovetoj kiuj reprezentas la majorecon de la laborista - socie-produktiva - parto de la popolo estas la organoj kiuj mobiligas la laboristojn por la revolucia atako. Ili estos ankaŭ la organizformo por la ŝtata potenco post la venko. Per ili k ne per la ekzistanta registara aparato kiu reprezentis la interesojn de la posedanta klaso faligos la laboristoj la diktatorecon kapitalistan k transprenos la potencon politikan. La laboristoj forigos la tutan maŝinaron de la kapitalista ŝtato por ke ĝi fariĝu nezzeble por kontraŭrevolucia laboro k ĉar ĝi kiel ilo por la estigo al la nova ordo taŭgas nenion. La sur la sovetoj bazanta laborista ŝtato anstataŭos ĝin. Dum ĝi rezervas la malfalsajn k esence demokratecajn rajtojn k iom post iom etendas ilin - ili estas pliaj ol iam sub la kapitalista diktatoreco - funkcios la laborista ŝtato kiel diktatoreco de la [illegible]ranta klaso kontraŭ ties malamikoj. lab

LA ROLO DE LA REVOLUCIA PARTIO.

Por la venko de la laborista klaso estas la ekzisto de revolucia partio de treega graveco, ja, ĝi eĉ estas kondiĉo. La klasbatalo funkcas per la armiloj de la klasoj. La laborista klaso kiel tutaĵo - k speciale ĝiaj alianculoj el la aliaj partoj de la popolo - ne estas tre homogena. Sen la revolucia partio la plej kuraĝaj ne povas ricevi iajn sukcesojn. La lab. kl. estas fendita per specialaj interesoj de kastoj, religioj, nacioj, rasoj, seksoj, junecoj, per sin kontraŭbatalantaj filozofioj. Ĝi kiel tutaĵo ne povas estigi la batalplanon k estri la batalon. Por tio necesas generalaro, avangardo, - ne nomigita se supre, sen eblo de kontrolo k konsento per la trupoj sed pro pruvita kapablo de la batalantoj mem nomigita. Tiu generalaro estas la revolucia partio. Ĝi ampleksas la plej progresintajn, plej sindonemajn k plej batalemajn laboristojn k unuigas ilin sur la bazo de pruvitaj principoj k kunfandas ilin per plej severa disciplino.

La revolucia batalo de la laborista klaso povas esti venkonta nur tiu kazo ke la marksisma partio estas haviginta al si la konfidon k la subtenon de la plimulto de la laborista klaso k gvidas ilin al atako. La unuecfronto de la diversaj laboristaj partioj k organizoj povas, kunfandita en la sovetoj, mobiligi la laboristojn k gvidi komencajn akciojn eĉ tiam kiam la revolucia partio nur estas subtenata per malplimulto el la laborista klaso. Sed ĝia gvidado al la konduto de la sovetoj estas necesa kondiĉo por la revolucia faligo al la kapitalista reĝimo k al la plifortiĝo de la laboristaro. La revolucia partio pro sama neceso gvidos la proletaron post la venko dum la konsolidiĝo de

ĝia potenco,dum la organizado al la socialista ekonomio,dum la subpremado al internaj kontraŭrevoluciaj malamikoj k dum militoj de la laborista ŝtato kontraŭ imperiistaj ŝtatoj.La rôlo de la partio kiel gvidanto de la klaso restos ĝis tiam kiam ĉiuj formoj de la klasa organiz inklude de ŝtato k partio estas forigintaj en la socialista socio.
LA LABORISTA PARTIO DE USONO. principoj
La L.P.U.fundamentas sur la firmaj de revoluciaj teorio k pratiko kiuj estas estigitaj de Marks k Lenin k proviĝis per la klasbata en internacia mezuro,speciale per la rusa revolucio en oktobro de 1917 La L.P.U.opinias ke estas ĝia devo apliki tiujn principojn en la nuna historia situacio.Car estas ĝia ĉeftasko la venko pri la malamiko en la propra lando;-la faligo al kapitalista registaro en Usono - prov os la partio unue pruvi al la laboristaro en Usono k al ĝiaj aliancul ke la apliko de la revoluciaj principoj de la marksismo estas la sola ilo por kontentigi ilŝajn historiajn interesojn k bezonojn.Ekirante de tiuj principoj la L.P.U.unue volas valorigi la internajn fortojn de usona tradicio k historio k adapti sian taktikon al la konkreta situo al la reala fortproporcio de la klasoj en Usono.
La L.P.U.estas la libera organizo de la klaskomscia avangardo kies anoj estas kunfanditaj per la en ĉi tiu deklaro esprimita idesistemo.Ĝiaj organizaj principoj estas demokrateco,centralismo k disciplino.Libera diskutado pri ĉiuj partiproblemoj,k libera kritiko,inklude de la kritiko je la gvidantaro,estas la rajtoj de ĉiu partiano .La gvidantaro ĝis al la Nacia Komitato estas libere elektata,kontrolata k povas esti demisiigata per la membraro.
La partikongreso estas la plej alta instanco de la partio k ĝiaj decidoj estas devigaj por ĉiuj partimembroj.Ĉiu membro havas la devon gardi la parti- k akciondisciplinon.La administrado al la partio estas centralisma.La pli malsupraj instancoj dependas de la pli supraj.La en la partikongreso elektita Nacia Komitato havas kiel reprezentanto de la tuta organizo la plej altan aŭtoritatecon.Ĝi rajtas agadi kiel la partio k devigi la pli malsuprajn instancojn al disciplino.La en fremdaj organizoj laborantaj partimembroj estas sub la kontrolo de la koncerna partikorporacioj.
Ĉiam k sub ĉiuj kondiĉoj la L.P.U.rezervos sian sendependecon,organize k politike.En ĝiaj rilatoj al aliaj politikaj organizoj,en unuecfront-akcioj aŭ en aliaj formoj de kunlaboro rezervas la partio al si la rajton al kritiko k principe malaprobas ĉiujn ne-kontraktojn dum ĝi aliflanke tamen rezervas la disciplinon en komunaj akcionoj.
LA FUNDAMENTOJ DE SOCIALISTA SOCIO.
La plej grava el ĉiuj ekonomiaj agoj kiujn devas fari la revolucia registaro en sia komenca periodo estas la eksproprigo k socialigo al ĉiuj industriaj k teraj monopoloj,minoj,fabrikoj,ŝipkonstruejoj,ĉiuj publikaj institucioj,fervojoj k aliaj organizataj trafikiloj,ĉiuj bankoj,kreditejoj,orprovizejoj k aliaj servoj kiujn la revolucia registaro opinias necesaj por konstrui la fundamentojn de la socialista socio.
Tiu socialigo nur estas kontraŭ malgranda aroto da finaculoj,bienuloj k industriestroj kies privata kontrolo pri la produktado en la lando estas la kaŭzo de la malsato,senlaboro,sensekuro de la granda amaso de la popolo.
La socialigpolitiko ebligos disponigi al ĉiu laborema laboristo bone pagitan laborejon,lin gardi je senlaboro k industria risko,maljuno k malsato.Ne necesos por la laborista ŝtato agadi kontraŭ la malgrandaj propraĵuloj.Oni povas atendi ke le ekzemplo de sociaj k personaj avantaĝoj de la socialista produktorganizo/ilin gvidos al libervola kolektivigo. /k la subteno per la lab.ŝtato...
La socialismo volas liberigi la produktfortojn por ke ili servu al la bezono de la homoj,ĝi volas ebligi al la produktado labori laŭ racia plano rilate al aktualaj sociaj necesoj.Ĝi volas ebligi la uzon de ĉiuj teknikaj plibonigoj.La libertempo k la edukeblo kiuj kunos ĉi tiuj materialajn plibonigojn kune kun la forigo de la malviva peza jo de la sensenca kapitalista kulturo ebligos ĉian individuan volon por vera kultura evoluo.
LA CELO SENKLASA SOCIO.
Samtempe kun tiuj materialaj k kulturaj ŝanĝoj pluiĝos la ekstermo al

ĉiuj socia senutilaj k parazitaj klasoj k grupoj.La tuta enloĝantaro de iu lando aliiĝos en kunularon da liberaj produktantoj kiu posedas la tutan produktilaroj k krudaĵejaron de la socio.La neceso subpremi la socie fremdajn(parazitajn)klasojn foriĝos kune kun la foriĝo de la klasoj mem.Per tio ankaŭ foriĝos la neceso de la ŝtato - eĉ de la labo rista ŝtato.La plej nobla objekto de la homa celado - la senklasa soc kiu enkondukos novan epokon por la tuta homaro - estos atingita.
La laborista klaso povas konstrui la senklasan socion nur fundamente de la internacia laborpartigo k internacia kunlaboro.La L.P.U.ne nur volas gvidi la laboristaron de Usono al la revolucio sed ankaŭ kuniĝi kun la laboristaro en tutmondo por efiki la tutmondan revolucion k konstrui la mondsocialismon.La modernaj produktadfortoj memdeviĝis la kapitalismon transiri la naciajn limojn.La imperiismo,mem estante rabulforto,ne povas konstrui harmonian socion.La tutmonda socialismo estas la sola solvo por la senordo k konfliktoj en la tuta mondo,k ankaŭ por la ĉefaj antagonismoj interne de la diversaj nacioj.La socialisma socio racie utiliĝos la naturajn krudaĵarojn por solvi la konflikton inter la fakta evoluo de la produktivfortoj k la artefaritaj naciaj limigoj,ilin k la produktilaron en la tuta mondo ĝi utiligos en la intereso de la tuta homaro.Ĝi donas al ĉiuj individuoj k nacioj la rajton al libera kultura memdecido k memevoluo.La mondsocialismo forigos la kaŭzojn de la internaciaj militoj kiuj sub la kapitalismo minacas gvidi la homaron fakte al barbareco aŭ eĉ al tuteca forigo.
KRITIKO JE LA EKZISTANTAJ PARTIOJ.
La fondo al nova partio estas la sola ebleco atingi la revolucian unuecon se la partio havas kiel bazon ĉi tiun programon.La provo kunfandi la programojn k taktikojn de la jam ekzistantaj partioj gvidus al sensencaĵo,ĉar zorgema analizo montras ilian malĝustecon k nesufiĉecon.
LA SOCIALISTA PARTIO.
La socialista partio ne estas revolucia sed reformista k pacifista.La plej fundamenta eraro de ĉiuj aloj de tiu partio estas ilia malĝusta opinio pri la naturo de la ŝtato k pri la kolonia problemo.El tiuj sekvas ties parlamentaj iluzioj,ties opinio ke la labotistoj en la kadro de la ekzistanta ŝtato povas konkeri la politikan potencon,ties fatiŝismo per kiu ĝi volas savi la kapitalisman demokratecon,ties politiko pri la kunlaboro de la klasoj k ties perfido al la koloniaj revolucioj k ribeloj.Ĝi estas membro de k obeas al la bankrota Dua Internacio,kiu devas respondumi por la konduto de la laboristaro okaze de la lasta milito, k ties ĉefa sekcio,la germania,socialdemokrata partio malkaŝe helpis al la kapitalistoj subpremi revoluciajn ribelojn de la laboristoj k tiel helpis al la sukceso de la faŝismo.La socialista partio ne gvidas ian batalon kontraŭ la reakciaj elementoj en la sindikata movado,ja,eĉ gravaj partoj de la partio estas en direkta aliance kun tiaj elementoj.Kvankam hodiaŭ kiel dum aliaj epokoj la partio enhavas multajn maldekstrulojn,kontraŭbatalas la potenca dekstra alo en la partio ĉiujn maldekstrajn tendencojn La radikalaj frazoj de la centrisma alo,kiu estas reprezentata per la gvidantoj de "Militant", devas kaŝi esence reformisman tendencon,k kapitulaciojn antaŭ la dekstra alo.La partio k la Dua internacio al kiu ĝi estas membro,do servas por eviti la konsekvencan evoluon de la laboristoj al la revolucia opinio.La vere revoluciaj laboristoj en la socialista partio do nur povas eviti la sekvojn de sia membreco se ili foriras de la reformistoj k socialpatriotoj k aliĝas al la L.P.U.k al la nova internacio.
LA KOMUNISTA PARTIO.
La akcepto de nacisma k tial nerevolucia teorio,kune kun la forigo al la laborista demokrateco en la Tria internacio k ties sekcioj estas la plej ĉefaj kaŭzoj por ties ruiniĝo k degeneracio.Post kiam la stalinistista burokrataro en K.P.S.U.kiu meĥanike regas pri la III.Internacio,foriris de la firma fundamento de revoluciaj principoj,ĝi ĉie faras centrisman zik-zak-politikon,kiu ekz.en Usono ampleksis de la oportunismaj kdopodoj je la ekstbiĝo al etburĝa "Tria partio", (de La Folette),ĝis al sektismo k ultra-(ega)maldekstrismo k radikalismo.
Nē ne eto da partidemokrateco ekzistas en la internacio aŭ ties sekcioj.
Tiuj sekcioj faris la fendistaktikon en la sindikatoj,k aliaj amasorganizoj(komparu S.A,T,-I.P.E.!)la politikon pri la estigo al sektecaj

sindikatetoj(flanke de la reformismaj sindikatoj),ili predikis la teorion pri la socialfaŝismo,k sekvis la taktikon,postuli la unuan tagon la unuecan fronton "nur de malsupre" k je la alia tago formigi la unuecan fronton tute formale sed "nur de supre" k ili subskribis ne-atakkontraktojn kun la reformistaj gvidantoj,ili uzis krimajn fiajn metodojn en la laborista movado ordonante ofte al siaj membroj disigi kunvenojn kunvokitajn de aliaj laboristaj organizoj k ataki la parolantojn havantaj alian politikan opinion.En iliaj propraj vicoj ĉiu persona opinio estas subpremata k la burokrataro regas absolute.
La Kominterno k ĝiaj sekcioj estas tutece k mekanike regataj de la Kompartio sovetia.Kiam por iom da tempo la revolucia tajdo en la aliaj landoj malgrandiĝis,necesis por la sovetiaj laboristoj koncentrigi ĉiujn fortojn je la ega tasko konstrui la fundamenton de la socialista socio en Sovetio,atendante baldaŭ ricevi sufiĉan helpon de la laboristo en la aliaj landoj kiam la venonta revolucia tajdo estos helpinta al ili konkeri la politikan potencon.Sed dum tiu problema tempopunkto la gvidantoj de la Kompartio sovetia opiniiĝis anstataŭ minimume fundamenti la socialismon en Sovetio kiu ja estas grava parto por la tutmonda socialisma movado,ke la soiclisma socio estas ankaŭ konstruebla en Sovetio sole,(teorio pri la socialismo en unu lando),malgraŭ ke la revolucioj en la aliaj landoj ne okzis,k ke la konstruo k defendo al la "socialismo en Sovetio"estas la unua - plej proksima - k fine la sola tasko de la tutmonda proletaro.Ĉi tiun vidpunkton mekanike ankaŭ devis akcepti la komunistaj partio en la aliaj landoj,k dum tiu procezo la restoj de la partidemokrateco foriĝis.Anstataŭ ke tiuj partioj koncentris sian atenton k energion antaŭenigi la revolucian movadon k faligi la kapitalisman sistemon en siaj landoj,ili estis preskaŭ nenio plu ol agitadgrupoj destinitaj al la t.n.defendo al Sovetio,k al la pacifista propagando"kontraŭ milito k faŝismo"ktp.
Ilia degenerado k malatento je la tasko plenumi la revolucion en la landoj kapitalistaj,malfortigis la veran defendon al Sovetio k helpis al la malvenko de la laboristoj en la aliaj landoj.Tion ja montris la germania K.P.Kiam Hitler ekregis.La vera defendo al Sovetio k la subteno al tiuj revoluciuloj en la S.U.kiuj batalas por la reformo de la sovetaj ŝtatoj k por la reviviĝo al la bolŝevista partio de la Lenina epoko kiu fundamentis sur la principoj de la revolucia internaciismo k laborista demokrateco do dependas de la konstruo al novaj revoluciaj partioj k de konstruo al nova revolucia internacio.Por faktigi ĉiujn tiujn celojn ni destinas nin kun ĉiuj niaj fortoj al la konstruo al vera revolucia partio en Usono.

CENTRISMAJ POLITIKAJ GRUPOJ.

La L.P.U.decide malaprobas centrismajn organizojn k tendencojn kiuj volas interpacigi la revolucian marksismon k la reformismon k pozicias sur la "ora meza vojo",ĉu ili estas internaciaj,ĉu naciaj.Malgraŭ ke la L.P.U.estas preta kunlabori kun ĉiuj grupoj kiuj evoluas de la reformismo aŭ centrismo al la revolucia marksismo ĝi neniam konsentos kun interpacigo kun reformisma aŭ centrisma politiko.-

SINDIKATAJ K MEZKLASULAJ PARTIOJ.

Nuntempe estas la Farmer-labour-party-movado en usono malforta k nekonsekvenca.Sed eblas ke ekestiĝas tre "radikala" Farmer-Labour-Party-movado aŭ kombino inter kamparista,sindikata k mezklasula movadoj kiuj provos reformi la kapitalismon.
Rilate al la pritraktado al tiaj problemoj staras la laborista movado antaŭ komplikita problemo.Estas la tasko de la revoluciuloj konstrui propran partion k ne partopreni la konstruadon al ia reformpartio.
Dum la periodo de la kapitalisma ruiniĝo la reformistaj partioj ne povas ludi progresecan rolon kiun ili ludis antaŭ jardekoj.Hodiaŭ povas ekonomiaj k politikaj rajtoj nur per plej decida k militisma klasbatalo esti forprenataj de la kapitalistoj.Cetere estas ĉiu partio kiu diras ke ĝi reprezentas du aŭ eĉ pliajn klasojn esence nur etburĝa partio k estas ĉiumomente preta kapitulacii antaŭ la grandkapitalistoj.Ni ne kredas ke la usona laborista klaso neevitebl̦e devas trairi la spertojn kun la reformistaj partioj,ke ĝi aŭ povas transsalti tiun etapon aŭ povas ĝin fari al mallonga periodo.Alia danĝero por la etburĝaj reformistaj movadoj nuntempe estas tiu - ili facile fariĝas la viktimo de la

demagogiaj alvokoj;ŝovinismaj paroloj k reakciaj pensoj pri la klas-harmonio kiu estas la ekkonilo de la faŝisma movado. Aliflanke la membroj de tiaj grupoj estas vere baroj de socia maltrankvilo k kontraŭeco kontraŭ la ekzistanta ordo.
La L.P.U.ellaboros sian taktikon je tiaj movadoj k grupoj sur la bazo de ties fundamentaj principoj.La tie starantaj devas esti gajnotaj po subteni la revolucianmovadon.Per teorio k historia ekzemplo montros ŝi ili la revolucia partio - speciale per sia propra aktiveco - ke la faktaj konsekvencoj de la politiko de la reformistaj movadoj ĉi tie kiel en ĉiuj aliaj landoj direkte kontraŭas al iliaj propraj celoj, ke ili helpas rezervi la kapitalismon k tial antagonas la interesojn de la laboristoj.Por ke ĝi efike plenumu la nomitan taskon devas la revolucia partio ĉiam rezervi sian politikan k organizan purecon k memstarecon.
LA NOVA INTERNACIO.
Laŭ ĝia esenco la laborista revolucio havas internacian karakteron. Se ĝi komencas en unu aŭ kelkaj landoj ĝi devas tuj en la aliajn ĝis kiam ĝi ampleksas la tutan mondon,k ekestigas la socialismon kiel tutmondan sistemon.Tial la revolucia partio devas esti internacio kun sekcioj en ĉiuj landoj.Por ni do necesas estigi revoluciajn partiojn en la tuta mondo k unuigi ilin al nova internacio.La necesoj de la laborista movado en pli fruaj epokoj gvidis al la estigo de la unua k pli malfrue - de la dua internacio, k postulis la estigon al la tria kiam la dua en la milita k postmilita epoko estis perfidinta la proletaron.Hodiaŭ estas la ekzistantaj Dua k tria internacioj bankrotaj. La problemo pri la tutmonda organizo ne estas solvebla per kunfandiĝo de la du internacioj aŭ per internacio kiu fundamentas sur miksaĵo el la bankrotpolitiko de ambaŭ.Nova,t.e.Kvara internacio kiu fundamentas sur la de Marks k Lenin estigitaj strategiaj k teoriaj principoj k kiu reprezentas la historian kontinuecon de la internacia laborista movado revolucia k aplikas la nomitajn fundamentajn principojn je la la historiaj ekzistaĵoj de la nuna sistemo estas konstruenda.La L.P.U. estas preta estigi amikajn rilatojn al ĉiuj grupoj k organizoj kiuj rekonas la saman kiel ni k kune kun ili kunlabori je la plej eble baldaŭa estigo al nova internacio.
LA BATALO KONTRAŬ LA IMPERIISMA MILITO.
La L.P.U.gvidos revolucian batalon kontraŭ la milito kiu estas nur forigebla per forigo al la socisistemo kiu estigas ĝin.Ĝi batalos per ĉiuj rimedoj je kiuj ĝi povas disponi por eviti la estiĝon de nova imperiisma milito.Ĝi kontraŭbatalas la ideon ke estas la interes o de la laboristoj subteni la defendon al la (kapitalisma)"patrio" ĉar tiu ideo ja fundamentas sur la komuneco de la klasinteresoj,komuneco, kiun malebligas la kapitalismo per sia naturo mem.
Neniel la L.P.U.subtenos ian de la kapitalista registaro de Usono(*) gvidatan militon,Kontraŭe ĝi kontraŭbatalos aktive tian militon k agados ne por la venko sed por la malvenko de la kapitalista registaro. La L.P.U.malakceptas la utopiajn k iluziajn ideojn de la pacifismo.Ni subtenos la militojn de la subprematoj kontraŭ la subpremantoj,de la sklavigitaj popoloj kontraŭ ties imperiismaj ekspluatantoj,de la kolonioj kontraŭ tiuj kiuj lasas ilin en sklaveco,ni subtenos la militojn de la nacioj,rasoj k minorecoj kiuj suferas sub la jugo de iu reganta klaso.La politiko de la pasiva resistenco estas tute netaŭga kiel batalilo kontraŭ la imperiisma milito,eĉ se tiuj kiuj ĝin aplikas estas la plej kuraĝaj k sinceraj.
Tia politiko validas ankaŭ kaze de milita alianco inter Sovetio k Usono (Tian aliancon povas Sovetio sub certaj kondiĉoj ne eviti.)Tiukaze la L.P.U.je samtempa senkondiĉa subteno al la sovet-laborista ŝtato

---

(*)La francia "komunista"partio voĉdonis ĉe la lastaj balotoj kontraŭ la elspezoj por la armeo - sed ne pro tio ke ĝi estas armeo de kapitalista,imperiisma ŝtato sed nur(!)pro tio ke estas ankoraŭ faŝistoj en la armeo!
Plue ĉiuj "komunistaj"partioj voĉdonis en la parlamentoj por la sankcioj kontraŭ Italio,t.e.por la ekonomia milito de la angla imperiismo kontraŭ la itala imperiismo...Ĉi tiuj partioj estas sekcioj de Kominterno!

montros la perfidajn intencojn de la registaro de la usona imperiismo
en ĉi tiu alianco k alvokos faligi ĝin k anstataŭigi ĝin per revolucia
laborista registaro kiu sole povas alianci kun Sovetio lojale k doni
al ĝi senliman subtenon.(')

LA DEFENDO AL SOVETIO.

Sovetio estas laborista ŝtato k fanalo por la entuziasmigo de la labo
ristoj en tutmondo. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kiuj estiĝis per la izol
igo flanke de la ringo da kapitalismaj malamikoj plenumis la rusaj
laboristoj jam mirindaĵojn k pruvis nedubiginde ke la planplana social
isma produktado superas la kapitalisman produktadon eĉ en ties plej
granda konjunkturo. La senkondiĉa defendo al Sovetio estas la devo de
ĉiu laboristo k de ĉiu progresema homo. Ĉiu provo de la imperiistoj
de iu lando ataki aŭ subfosi Sovetion trovos la revoluciulojn en L.P.
U. preta defendi ĝin nepre.

Esence la vera defendo al Sovetio ne povas esti fundamentata sur la
Ligo de Nacioj, Ne-atak-kontraktoj aŭ similaj aferoj, sed nur sur la
sukcesintaj laboristaj revolucioj en la aliaj landoj.('')

LA ĈEFA TASKO de la L.P.U.

La plej ĉefa k direkta tasko estas la mobiligo al la amasoj en Ameriko
por la batalo kontraŭ la imperiismo k la preparo por ties faligo. Por
tiu celo laboros la partio en ĉiu amasaj organizoj de la laboristoj k
kamparistoj k subtenos ilin ĉe ĉiuj direktaj praktikaj bataloj, strik-
oj, demonstracioj, amasaj akcionoj, por socialaj plibonigoj k sekurigoj,
batalo kontraŭ la linĉo, lokoŭto, ktp, k provos doni al ili gvidadon.
La L.P.U. perpropraj kandidatoj k propraj programoj partoprenos la
balot- k elektkampanjojn, sed tamen sen semi la danĝeran iluzion ke
la laboristoj per tiaj rimedoj povas atingi sian liberigon.(''')
Balotkampanjoj servas ĉefe por la revolucia propagando. Niaj kandidatoj
kiuj estos elektitaj en la parlamentojn aplikos sian situon por malkaŝi
la mensogon pri la kapitalista "demokrateco" k antaŭenigi la amasan
movadon de la laboristoj. La L.P.U. gvidos konstantan propagandon por
instrui al la avangardo de la laboristoj la principojn de la revolu-
cia marksismo. Ĉie ĝi pruvos la aplikecon de siaj principoj k sia takt-
iko k sian rajtigitan postulon je la gvidado al la amasaj laboristaj
movadoj.

LA SINDIKATOJ.

La sindikatoj estas la elementa k la bazo por la defendo de la laborista
klaso kontraŭ atakoj kapitalistaj. La ĉefaj sindikatoj estas tiuj en la
la grandaj entreprenoj, muelilejoj, fabrikoj k minoj de la
bazaj industrioj. ("ŝlosilaj industrioj").

La partio enpenetros en la sindikatojn de ĉiaspecaj laboristoj por
aktivigi iliajn batalojn k formi la batalojn al politikaj. La plej
grava celo de la L.P.U. rilate al la sindikatoj estas, konsciigi al ili
la klasbatalon k kongruence je tio helpi al la evoluo de batalema
gvidantaro. Por tiu celo ĝi estigos nepacigeblan batalon kontraŭ la
reakcia oficistaro en la sindikatoj. Ni instigos al la laboristoj en
la sindikatoj batali kontraŭ la [illegible], korupcion, gangsterismon
de la sindikatestroj k kontraŭ la [illegible] la gvidantoj evidentiĝanta emo
je la kunlaboro inter la klasoj. La L.P.U. postulas la kontrolon "de
malsupre" k la sindikatdemokratecon. Ĝi iniciatos la organizon al la
"maldekstraj" k progresemaj elementoj por la batalo por militeca,
klasbatala politiko k gvidantaro en la sindikata movado.

La L.P.U. propagandas la unuecon de la sindikatoj ĉar sindikata skismo
faciligas al la faŝismo k reakcio la antaŭenmarŝon. La L.P.U. kontraŭ-
batalas la politikon de la Komunista partio estigi sindikatojn sur la
papero kiuj ne estas veraj amasaj organizoj. La L.P.U. favoras la
organizadon de la laboristoj en la American Federation of Labour resp.
ties aliĝintaj sindikatoj kie tio estas eble ĉar la A.F.L. estas vera
amasa organizo k la tendenco de la sin nun organizantaj laboristoj havas

(') komparu kontraŭe la perfidan sintenon de la francia "komunista" par-
tio rilate al la francia-sovetia kontrakto! ('') komparu kontraŭe
la perfidan sintenon de Litvinof en la Ligo de Nacioj! (''') Kontraŭe
estis la devize de la dania "komunista" partio ĉe la lastaj elektoj
ekzemple de tipe [illegible] elektdevizo ("Pluajn komunistojn
en la parlamenton!") Ĉie en tutmonde estas la kompartioj likvidintaj
la marksismon k leninismon!

havas la saman direkton.
Tamen la L.P.U.ne kredas ke la A.F.L.havas monépolon sur la kampo de la sindikata organizo.Tro ofte la sindikata burokrataro malbonvenigis la laboristojn de la grandaj industrioj tiel ke ĝi postulis la formigon de la craft union(sindikata nur por la altkvalitaj lab.)Multkaze gravaj grupoj per evidenta strikperfido,burokrata persekuto k ĉikanado,krimoj k aliaj malbonaĵoj kiuj miskonfidigas al la sindikat devigis al eksmembriĝo.Kiukaze la amasoj pro tiaj nesufereblaj situoj formos sendependajn sindikatojn la L.P.U.subtenos iliajn klopodojn k batalojn.Ni decide malaprobas la manovrojn de la Komunista partio kiuj celas la likvidiĝon al la sendependaj sindikatojsen konsidero al la ŝituo kiu estigis ilin, k sen konsidero al ilia amasa bazo aŭ al la volo de la membraroKie la A.F.L.ne volas aŭ ne povas organizi la laboristojn helpos la L.P.U.al tiuj laboristoj konstrui sendependajn sindikatojn(industrifakajn)Sed ĝi daŭrigos batali por unueca industrie organizata batalema movado sindikata.

La L.P.U.aprobas la t.n.industrifakajn sindikatojn k provos helpi al la kunfandiĝo en ĉiuj fakoj kie tio necesas.(')

Ni admonas la organizitajn laboristojn je la tendenco kiu speciale post la N.R.A.rimarkiĝis:ligi la sindikatojn al la kapitalista registaro. Tiu politiko kiu estas subtenata per multaj gvidantoj de A.F.L.devas, se ĝi daŭrigos,nepre gvidi al senhelpo de la sindikatoj,al malgrandigo de ilia strikrajto k rajto komisii strikpostenojn,al malhelpo al ĉia aktiveco k al malfortigo al la resistforto de la laboristoj.

KAMPARLABORISTOJ K KAMPARPOSEDANTOJ.

La parto de la kampara loĝantaro,sur kiu direkte bazas la L.P.U.estas la kamparlaboristoj kies vivindekso estas ankoraŭ pli malalta ol tiu de la industriaj laboristoj k kies klopodoj organizi sin estas subpremata en plej brutala maniero.La organizado de tiuj laboristoj en batalemajn sindikatojn estas tre grava parto de la evoluo de la revolucia movado en Usono.La L.P.U.helpos speciale al tiu tasko k promesas subteni ĉiujn batalojn de la subpremataj kamparlaboristoj per la tuto de sia forto.

Milionoj da share croppers(laŭvorte:kooperativaj rikoltlaboristoj)k lu-farmistoj en Usono suferas preskaŭ sklavecon k havas mizeran vivon. Eĉ la farmistoj kiuj formale posedas la teron kiun ili prilaboras dronás en pligrandiĝanta ŝarĝé da ŝuldoj k hipotekoj k estas pro la kapitalismo ĉiam pli malmulte povantaj vivi per la vendo al siaj produktaĵoj.Ilia terura mizero gvidis ilin al egaj strikmovadoj,al lakt lakt-strikoj k demonstracioj kontraŭ konfiskoj k eksmitoj ktp.Tiuj bataloj konsekvence povas havi progresan karakteron sed nur tiam povos havigi efikajn rezultojn se ili estas direktataj kontraŭ la kapitalisma sistemo.

Por la farmistoj kiel por ĉiuj subpremataj socikastoj la libero k sekuro nur estas atingebla en la alianco kun la laborista klaso en la batalo por socialista socio.

LA NEGROJ K ALIAJ SUBPREMATAJ RASOJ.

La negroj estas la plej multe ekspluatata k plej persekutata parto de la popolo de tiu ĉi lando.La diferencoj inter la rasoj estas uzataj de la kapitalisma diktatoreco por malaltigi la vivstandardon de la laboristoj ĝenerale k malebligi al ili sin unuigi kontraŭ siaj subpremantoj k tiel verigi sian tutan liberigon.La L.P.U.seninterrompe laboros konvinki la blankajn laboristojn unuflanke k la negrajn laboristojn k aliajn subprematajn rasgrupojnkiel japanoj,Meksikianoj,Filipinanoj ktp aliflanke ke iliaj interesoj estas la samaj. La elementa problemo estas tiu.unuigi la laboristojn sen respektivo al ilia raso en ekonomiaj k politikaj organizoj por komuna batalo.

(') Industrifakaj sindikatoj havas la principon - en ĉiu entrepreno nur unu sindikato.La elementoj(entreprenaj sindikatoj)unuiĝas poste laŭ industriaj grupoj.La alia speco - profesifakaj sindikatoj - estas asocioj de laboristoj el nur unu profesio.Tiel povas okazi ke en unu entrepreno estas dekduo da sindikatoj.La industrifakaj sindikatoj estas tial pli batalfortaj k pli "radikalaj" ol la profesifakaj.La sovetiaj sindikatoj estas industrifakaj.

La L.P.U.batalas por tuta egalrajtigo de negroj k ĉiuj aliaj subprem mat aj rasoj,ekonomie,politike,socie,kontraŭ diversaj salajroj,kontraŭ la linĉado,kontraŭ la "Jim Crewism",kontraŭ la ekskludo al negroj k aliaj grupoj el sindikatoj,k ĉiu alia formo de rasa aŭ nacia ŝovinismo. Samtempe ĝi akcentas ke la negroj ne povas atingi la liberigon per alianco kun la negraj kapitalistoj k etburĝoj aŭ per la tiel negra kapitalismo.Nur per la tuta neniigo al la kapitalismo ili sin povas liberigi de diskriminado,ekspluatado k tiranio.

LA KOLONIAJ POPOLOJ.

La laboristoj en Usono,k la popoloj en Iberameriko,Filipinoj,Havajo k Liberio havas unu komunan malamikon - la usonan kapitalismon.La L.P.U.Junas al tiuj popoloj sian nelimigitan subtenon en la batalo kiun ili gvidas por la nelimigita rajto pri memdecido,libere de ĉiu ekonomia,milita aŭ politika interveno aŭ premo flanke de la usona imperialismo.Nia partio estas por la senkondiĉa k direkta sendependeco de la Filipinoj,de Havajo,Portoriko,Virginaj insuloj k aliaj dependaj ŝtatoj k kolonioj de Usono k por la returnigo de ĉiuj soldataj detaĉmentoj el la ekstere de Usono situataj regionoj.Plue la L.P.U.decidis aktive opozicii kontraŭ ĉiu celado de la usona kapitalismo kaŝe aŭ malkaŝe enpenetri en la memdecidrajton de iu popolo aŭ nacio.

La revolucioj en la koloniaj,preskaŭkolonioj k influsferoj de la usona imperiismoludos gravan rolon en la revolucia batalo por la faligo al la imperiistaj ekspluatantoj en la ĉeflando k renverse.Sukcesinta revolucio en Usono estas decidonta por la por la fato de la laboristoj en la tuta ibera amerikos... en la iberamerikaj ... aŭ en iu de la koloniaj aŭ preskaŭ koloniaj landoj de Usono ekestiganta revolucio povus sin ekspansii tra la tutan kontinenton k rapidigi la evoluon de la klasbatalo k la revolucion en la ĉeflando.La batalo kontraŭ la usona kapitalismo en ties ĉeflando k en ties granda imperio do estas nepartigeble kunigita.La L.P.U.subtenos aktive tiujn batalojn k provos ilin kooordini.

SPECIALISTOJ K TEKNIKISTOJ.

La specialaj k teknikaj laboristoj havas gravan taskon en la batalo por la faligo al la kapitalismo k estigo al nova socia ordo.Pro tio la L.P.U.helpos al tiuj laboristoj estigi ekonomiajn organizojn aŭ ĝi provos enpenetri en la ekzistantajn.Ĝi celados forigi la tradiciajn kontraŭaĵojn de la amerikaj specialaj k teknikaj laboristoj kontraŭ la partopreno je sociaj k politikaj batalojn,k enigi ilin kunekun ĉiuj aliaj grupoj de ekspluatatoj en la revolucian laboristan movadon.

LA SENLABORULOJ.

La granda k jam tiel longe ekzistanta armeo de senlaboruloj estas en la la periodo de rapida disiĝo de la kapitalismo la kolektujo por ĉiaj socio nekontentaj.En la situacio kiam por la senlaboruloj la vivo estas perdinta ĉian sencon sopas ili aliĝos al la movado kiu konvinke promesas al ili novan k sekuran situon en la sociala ordo.Se la movado de la laborista klaso ne ampleksos ankaŭ la senlaborulojn subtenante iliajn batalojn k konvinke montrante al ili la revolucian vojon el la krizo ili fariĝos la viktimoj de la ŝovinisma militisma propagando k de la faŝisma demagogio.La L.P.U.opozicias kontraŭ ĉiuj provoj estigi barojn inter la senlaboruloj k okupatoj k ĉiam akcentos la komunon de la interesoj de ambaŭ.Ĝi en la akcento montros kiel oni povas kunigi la batalon de la laboruloj k senlaboruloj kontraŭ la komuna malamiko.ĜI Junas subteni ĉiujn batalajn de la senlaboraj amasoj kontraŭ eksmitoj, por plifaciligoj k sociaj sekuroj.

LA JUNLABORISTOJ.

La kapitalisma sistemo estas dum sia tuta ekzisto karakterizita per la abomena ekspluatado al junuloj k infanoj.La kapitalisma socio povas hodiaŭ eĉ je malsatigaj salajroj ne doni al milionoj da siaj junuloj laboron.Ĝi nur povas doni deviigantan mensogon k veran neniigon en faŝisma reakcio k milito.

La laborista k studanta junularo trovos en la L.P.U.kies celo estas la estigo al socialista socio la ĉiaman antaŭbatalanton por siaj interesoj.La partio do transprenos kiel unu el la plej gravaj taskoj la estigon al junula organizo kiu ampleksos la junlaboristojn,junkamparanistojn k studantojn k fundamentas je la partiprincipoj de la revolucia marksismo.

LA UNUECA BATALFRONTO.
Malgraŭ la organizaj k politikaj diferencojdevas la laboristoj por defendi siajn rajtojn k plüigi siajn interescjn unuece agadi. Se ili tion ne faras estas salajro-k subvencimalaltigoj, kreskanta forigo al politikaj k civitanaj rajtoj, k fine milito k venko de la faŝismo certaj. Tio ne signifas ke oni faru la malĝustan k praktike nepoban politikon kiel ĝi prop onigis de la komunista partio per la "unueca fronto nur de malsupre". Same la L.P.U. malaprobas la propravolajn aranĝojn inter la oficialaj burokrataroj kiuj estas aldevigataj al la amasoj, k la t.n. "ne-atak-kontraktojn" kiuj fakte signifas kapitulacion antaŭ la reformista tendencoj, kaj ili malheligas la principajn diferencojn inter la reformistoj k la revolucia partio. La L.P.U. estas por honesta, zorgeme firmigita unueca fronto por specialaj k direktaj celoj de la laboristoj. Tiaj unuecfrontakcionoj je kiuj la partoprenantajorganizoj rezervas sian tutan organizan k politikan liberon instruas al la laboristoj la neceson k la valoron de la unueca fronto, montros la malforton k la perfidon de la reakciaj k reformistaj gvidantoj k donas al la revolucia partio la okazon montridum la aciono la ĝuston de siaj principoj k de sia taktiko. Tial la unuecfrontakcionoj estas nepra preparo por la revolucia unueco kiu en la revolucia situacio ebligos al la laboristoj preni la politikan potencon.

EPILOGO.

Tio estas la programo de la L.P. en Usono, unu el tiuj partioj kiuj batalas por la Kvara Internacio. Nun la stalinistoj malkaŝe preparas la likvidiĝon de la Kominterno k de ties suborganizoj - ni ne malkonsentas ke ili likvidas organizojn kiel ekz. I.P.E., la ruĝajn sindikatojn ktp, sed la formo de la likvidiĝo nepre estas malaprobinda - k jam komencas propagandi la unuecan partion laboristan - kp Francio, Kanadio, Britio ktp - t.e. ili malkaŝe perfidas la laboristan movadon. Sed ĉiuflanke kreskas ĉie en la mondo la movado por la Kvara internacio. Ĉi tiu programo estas pruvo por tio!

REDAKCIAJ KOMUNIKOJ.

Ĉi tiu kajero estas la dua eldono (decembro) de la tria kajero de LA PERMANENTA REVOLUCIO. UNua eldono aperis en septembro. De la unuaj eldonaĵoj estas kelkaj ekzempleroj ankoraŭ haveblaj. Ni petas ĉiujn kamaradojn sendi monon - membrokotizon aŭ abonmonon - por ke ni povu daŭrigi la serion! Laŭeble aperos post kelkaj semajnoj kritiko pri la sepa mondkongreso de Kominterno, se ni ne sufiĉe frue ricevas la manuskripton aperos anstataŭe la primilitaj tezoj de la I.K.L. (La Kvara inetrnacio k la milito), la plej bona marksisma pritrakto pri la milita problemo kiel kvara kajero de nia organo.

La jenaj gazetoj havis recenzon aŭ mencion pri La perm.rev.
ARGENTINA ESPERANTISTO (Misiones 369, Buenos Aires), LA SEMANTO (kial ne plu sendata al ni? K'dino Mad Mevo, 34 rue des Pitons, Genève) LA SOCIALISTO (F. Chamarre, Le Gabut, La Rochelle, Francio) LA LABORISTA ESPERANTISTO (Tre longa recenzo. L. Rosenbloom, 79 Bent. Str., Cheetham, Manchester 8, Britio)
En la jenaj gazetoj aperis artikoloj pri la IV'a internacio aŭ sim.
SUR POSTENO, majo, artik. pri svisia lab. esp, kongreso, (Amsterdam Z, Postbus 25) LA SEMANTO kun art. de Trockij, SENNACIULO kun organizaj komunikoj de Bolenfrasat, LA lab. ESP. k NIA BULTENO kun org. kom. de Bolenfrasat, SVIDA LAB. ESP. aperigis antaŭ kelkaj monatoj longan proteston redakcian kontraŭ nia propagando.
Estas sendataj al ni plue antaŭ kelkaj monatoj, sed pro teknikaj kaŭzoj nur nun publikigataj BULGARA ESPERANTISTO (Adreso?), LA SUDA STELO (Slavonski Brod, poŝtfako 44). AŬSTRIA ESPERANTISTO petis pri publikigo de komunikoj pri la 28-a burĝa esp. kongreso, kion ni kompreneble ne faras, adreso Wien I, Neue Burg. Plue lasttempe HEREZULO, adr. Esperanto, 14, av. de Cerbera, Paris 12-e, plue LABOR. ESP. de NORVEĜIO.
Kelkaj burĝaj gazetoj ŝajne ne opinias necese recenzi nin.
De k-do Lanti ni ricevis Broŝuron kiun ni recenzis en la unua eldono, ĉi tie ni bedaŭre ne plu havas spacon. Vd. la postan kajeron!